# *Ekis naciaj cibersekurecaj agotagoj*




**Foto: ACN**

Havano, nov 20 (RHK) Ekde hodia?, Kubo okazigas  la trian Nacian Tagon pri Cibersekureco kun la celo altigi la percepton pri riskoj en la uzo de informaj kaj komunikadaj teknologioj.

?is la venonta 30-a de novembro okazos renkonti?oj inter la lo?antaro kaj la profesiulojj de la teknologio por kulturi scion pri la administrado de enhavo kaj platformoj por eviti fari a? esti viktimoj de krimo pro manko de scio a? instigo de triaj.

La? la direktoro de institucia komunikado de la Ministerio de Komunikado, Cecilia Valdés, anka? estos pritraktata la graveco krei pasvortojn en elektronikaj spacoj kiel sociaj retoj, personaj komputiloj kaj la starigo de akredita?oj por bankkartoj.

Valdés sciigis  ke kun la partopreno de la diversaj sektoroj de la lando okazos konkursoj pri kapabloj kaj teknologiaj foiroj.

Cibersekureco en la kariba nacio temigas la protekton de kritika infrastrukturo, kiel ekzemple industrioj, la sansektoro, energio kaj transportado.

Kubo anka? donas specialan atenton al la protekto de la cifereca ekonomio, la? la ?enerala direktoro de la Komputila Reto Sekureca Oficejo, Daniel Perea.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/370169-ekis-naciaj-cibersekurecaj-agotagoj

**Radio Habana Cuba**